



# ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, Uralské nám. 9. — Redaktas dr. Stan. Kamarýt.

## Rosteme!

· Rosteme a ještě porosteme, díky neutuchající činnosti všech našich samideánů, kteří se s opravdovým elánem pustili do práce pro vítězství naší věci. I když jsme si nestanovili nějaký přesně vypočítaný pracovní plán, plníme každý na svém místě, co nám přikazuje doba, v níž žijeme. Při tom každý z nás, nebo většina z nás, musí plnit ještě povinnosti uložené povoláním, rodinou, funkcemi atd., neboť esperantisté jsou jako živé stříbro, iniciativní a užiteční v každé osvětové činnosti, a co hlavního, nejoddanějšími služebníky naší drahé republiky jak doma tak v zahraničí pomocí esperanta, svých esperantských přátel. To je služba vlasti, již zhodnotit snad ani nelze. To je ono, co nevidí vnější svět a nikdy řádně vidět nemůže ten, kdo nepronikl do ducha esperantského hnutí, kdo se spokojí jen paušálním zjištěním, že esperanto je sice dobrá věc, ale nemá mohutné organizace, která by dovedla své číslo dát v patřičný moment na váhu. A toto zběžné konstatování některých jednotlivců je právě předmětem mého článku. Setkávám se s ním často hlavně u našich úřadů, kde jsem z čista jasná postaven před otázkou: »A kolik vás je?« »Jménem kolika organizovaných mluvíte?«

Moje odpověď? »Hodně a málo! Abychom již vůbec zanikli, na to je nás příliš mnoho — nezanikneme! Abychom plně s naší pravdou prorazili, na to je nás opravdu málo.« Proto je velmi důležité využít každé příležitosti k šíření naší myšlenky a opřít se při tom o všechna existující kulturní střediska v republice. Musíte předně proniknout do Lidovýchovných škol za pomoci Místních osvětových rad.

V každé obci je tato Místní osvětová rada a jistě ráda vyhoví pokynu ministerstva školství, které rozeslalo na moji žádost již oběžník o spolupráci s esperantisty v Čechách, na Moravě i ve Slezsku. Je pouze třeba s ní zahájit styk. Naše hnutí musí být posíleno od spodu — i lidem na našem venkově, hlavně v pohraničí, kde se sešli lidé z různých míst republiky a na bazi esperanta se mohou navzájem seznamovati a zamezit tak předčasnému rozštěpení politickému, které v našem pohraničí hrozí. Nic by nebylo našemu novému státu osudnější, nežli politické třenice v pohraničí. To by byla voda na mlýn panů Schumacherů v sousedním, dosud nacistic-

kém, Německu. Esperantem pomáhejme udržovati silnou a zdravou Národní frontu, bez níž by nebyla možná ani naše vlastní práce při budování silné organizace esperantistů čs. Svou činnost zaměřte i do závodních klubů. Závodní kluby jsou kulturním střediskem ÚRO, jež jsou zřizovány jednotlivými svazy, soustředěnými v ÚRO. Každý větší podnik má nebo bude mít takový závodní klub s řádným organizačním řádem a je pro nás esperantisty nad jiné důležité, aby v tomto pracovním, organizačním řádu bylo zapojeno i esperanto. Pak máme naději, že široké masy pracujícího lidu se budou esperantu učit.

Závodní klub je základnou pro zábavně společenský život zaměstnanců po skončení práci, je odborářským místem družnosti a přátelství v závodě i mimo závod. To je ono, co sleduje esperanto již od svého vzniku a proto pro nás esperantisty jest nejvhodnější pole působnosti mezi pracujícím lidem. To vám všem kladu velmi na mysl. V závodních klubech můžete začít téměř s holýma rukama, tam vítězí vůle, odvaha a vytrvalost. ROH vydá časopisy pro závodní kluby, v nich musí esperanto uhájit své čestné místo. Naše heslo musí být: »K lidu a s lidem«. Směrodatné nám musí být i Masarykovo: »Co lid nezná, nikdo nezná.« Esperantisté-sokoli a hlavně naši krajští důvěrníci ať ihned navážou kulturní spolupráci se sokolskými župami. Nechť nikdy žádný sokol nemusí mluvit v cizině nebo i doma s cizincem německy. Všude tam, kde dosud bylo používáno němčiny, propagujte esperanto. Stojíme před řadou mezinárodních událostí na poli kulturním v ČSR: Sjezd světové mládeže, veletrhy, hudební festival, jubilejní oslavy r. 1948, Vsesokolský slet, Olympiada železničářů atd. a potřeba mezinárodního jazyka bude stále větší a větší, nebudeme-li chtít trpět nadále němčinu. Kdo se naučí anglicky nebo rusky, již natahuje ruku po lepším pracovním místě, chce být lépe placen, což je přirozené, neboť »hoden jest dělník mzdy své«, ale kolik se jich této řeči vskutku může tak naučit ve svém intenzivním zapojení do práce, aby se ctí obstáli před cizinci? Proto je esperanta naléhavě potřeba ve všech oborech našeho veřejného života, zvláště pak u zaměstnanců v dopravě (letectví, železnice, pošty, roz-

hlas, pouliční dráhy, silniční doprava a doprava vodní), dále služba bezpečnostní a zdravotní, studenti, skauti a veškerá mládež bez rozdílu by měla mít možnost se naučit esperantu již od čtvrté měšťanské třídy. Ministerstvo školství by mělo odstranit nesociální příplatek za učebné předměty nepovinné (asi 2.50 Kčs za 1 vyučovací hodinu) a řádně zaplatit učitelům esperanta. Zatím doporučujeme našim učitelům, aby pořádali kursy esperanta za pomoci Místních osvětových rad v Lidové škole, za kteroužto vyučovací hodinu dostanou 30 až 40 Kčs. Nemohu přehlédnouti, že se rozdělení naší práce na kraje plně osvědčilo. Zvláště se osvědčily kraje Ml. Boleslav, Hradec Králové, Plzeň, Liberec a Olomouc, z nichž některé již měly své krajské schůze, pro krajskou činnost velmi důležité, neboť tam získáváme přehled, co bylo v kraji na espe-

rantském poli vykonáno. Naše krajské rozdělení nekončí v 19. kraji opavském, nýbrž bude v nejbližší době rozšířeno na kraje slovenské, a to 20. se sídlem v Bratislavě, 21. se sídlem v Trnavě, 22. kraj Trenčín, 23. Nitra, 24. Žilina, 25. Liptovský Svätý Mikuláš, 26. Báňska Bystrica, 27. Prešov a 28. Košice. Krajskými důvěrníky svazu budou samideáni z imenovaných míst, čímž bude naše výstavba krajská dobudována a podáme si tak s bratry Slováky ruku ke spolupráci za jedním cílem: Za vítězství světového smíření všech národů, jak o tom snil velký náš učitel národů Jan Amos Komenský a jak si to jistě ze srdce přeje veškeren pracující lid světa. Otevřete cestu esperantu, otevřete cestu srdce k srdci. Zmizí starý, podlý svět. Zavládne nový mír na zemi, v němž nesmí býti běd. Dále, jen dále nesme náš zpěv!

Adolf Malík.

## Dopis Petra Bezruče

Náš spolupracovník dr. T. Pumpr poslal Petru Bezručovi seznam všech vyšlých překladů z jeho Slezských písní. Dostal od něho rukopisně psanou novoročenku tohoto znění:

Do nového roku.

V lednu ostrý zefyr věje,  
jenž nás štípe, aniž hřeje,  
takže mladý — starý kleje:  
Sto pěrůň, v zimě zle je!

Tento verš líbezný přeje  
kmetík, který DOSUD zde je,  
ač se časem třepe, chvěje.  
VAM dobrého zdaru přeje.

Pane doktore, jsem velmi potěšen pozorností, kterou mi esperantisté vůbec a Vy zvláště věnovali. Dříve i příště. Já sám se dívám na své verše jaksi spatra, vzpomínaje slov Vergilových: »Snad byl jsem básníkem, když jménem tím mne všichni zvou, však já jim nevěřím.« Děkuji Vám za laskavá slova v písmě a zůstávám Váš 25./XII. 46.

Petr Bezruč.

## André Simone: Nova ratkaptisto el Germanio

Hitleranan aserton ni legis en Heroldo de Esperanto: »Prijuĝante situacion de germanoj, oni ne forĝesu, ke ili posedas tiom ekstreme malgrandan vivospacon!« Ni ĉeĥoj ne forĝesis ankoraŭ tiun ĉi atentindan aserton de germanoj. Ilia »vivospaco« ne sufiĉas por ili. Kaj dum tiu ĉi plora asertado ni aŭdis de la samaj plorantoj fajrajn alvokojn al samnacionoj havi pli kaj pli grandan nombron de idoj. Kaj samtempan aserton, ke la ĉeĥoj havas nenian vivospacon, kiu apartenus al ili laŭ naturaj leĝoj. Estas instrue diri, ke ekz. belgoj, kvankam ilia lando havas pli grandan densecon de loĝantaro, neniam asertis, ke pro tio ili rajtas ekposedi la spacon de la najbaroj. — Por informi nian fremdlandan legantaron pri ĉeĥa vidmaniero, ni publikigas tie ĉi tradukon de artikolo de ĉeĥa eminenta ĵurnalista, aperinta en semajna gazeto Svět v obrazech (Mondo en bildoj) la 22. XII. 1946.

Estas antaŭ mi du fotografajoj. Ili vidigas oratorantan viron. Histerie streĉitaj okuloj. La oratoro ŝajnas esti en ekstazo. Vi atendus ĉiunmomente, ke li ekvokos: »Heil Hitler!« aŭ minimume »Deutschland erwache!« Li tion ne vokos,

sed alimaniere liaj paroladoj ne diferencas tro nek laŭ la tono nek laŭ la formo nek laŭ la enhavo de esprimiĝoj, kiujn diradis Hitler deposedi sia unua sin prezento en München. La oratoro, kies bildojn mi havas antaŭ mi, estas Dr Kurt Schumacher.

Ĝi estas nova stelo sur politika firmamento Germania, kiun denove per teleskopo studas multaj politikaj astrologoj, dum la plimulto el ili efektive stelan konstelacion ne komprenas. Se vi legas la anglan gazeton pri vizito de Dr-o Schumacher en Londono, vi havas impreson, ke fine demokratio en Germanio trovis sian reprezentanton, ke sufiĉas helpi lin kaj liajn amikojn kaj Germanio revenos pli frue ol vi estas dirintaj »dudek unu« en familion de pacamaj nacioj. Sed se vi legas deklarojn de dr-o Schumacher en Anglio aŭ en Germanio, tiam vi konsciigas, ke tie ĉi parolas nova protagonisto de germanaj ŝovinismo kaj imperialismo. La anglaj aŭskultintoj de doktoro Schumacher substrekas en siaj artikoloj, ke li travivis dek jarojn en germana koncentrejo, ĉar li estis kontraŭulo de nazismo. Tio konfirmas sole tion, ke ne ĉiu kontraŭulo de nazismo estas same kontraŭulo de germanaj ŝovinismo kaj imperialismo. Tio konfirmas sole, ke doktoro Schumacher malkonsentis kun Hitler pri metodoj sed ne pri la celo.

Hitler proklamis, ke komunismo estas »ĉefmalamik« de homaro. Dr-o Schumacher gvidas sian ĉefan atakon kontraŭ komunismo. Hitler bazis sian balot-kampanjojn sur mensoga propagando kontraŭ la Soveta Unio. En kunvenoj de doktoro Schumacher vi renkontas ĝin denove. Hitler postulis pli da »Lebensraum«. Doktoro Schumacher rakontas al germanoj, ke aliancoj ilin subpremas. Hitler diris antaŭ anekso de Aŭstrio, ke limoj aŭstri-germaniaj estas sole formalaj. Schumacher proklamas, ke li pri-traktas ilin provizoraj.

Doktoro Schumacher parolas kontraŭ Sovet-unio, ĉar ĝi onidire »eksportas« germanajn laboristojn en sian landon por laboro. Kontraŭ Anglio, ĉar ĝi onidire ne donas al loĝantaro sufiĉe por manĝi, kontraŭ Francio, ĉar ĝi volas karbon el Ruhr-lando, kontraŭ Ameriko, ĉar vicgubernero generalo Clay deklaris, ke la for-naziigo iras tro malrapide. Sole pri unu afero li ne ekparolas: pri respondeco de la germana nacio pro la milito. Doktoro Schumacher pri-skribas per vortoj kortuŝaj »netolereblan suferon« de la germana nacio. Pri tio, kion estas trasuferintaj preskaŭ ĉiuj nacioj de Eŭropo dum la milito kaj okupacio, doktoro Schumacher ne rakontas. Li priskribas al la aŭskultantaro, ke malmuntadoj de germanaj uzinoj por reparaĵoj celoj kondukos la germanan nacion en pereon. Pri dekmiloj da uzinoj forportitaj aŭ detruitaj de germanoj en slavaj landoj kaj en okcidento li diras nek vorton.

Doktoro Schumacher vokas germanan nacion denove por batalo. Kontraŭ kio? Kontraŭ nazistoj? Kontraŭ la Hitlera ideologio? Kontraŭ ŝovinismo? Kontraŭ imperialismo? Ne! Kontraŭ german-polaj landlimoj, kiel estis difinitaj en Postupim.

Mi parolis antaŭ nelonge kun angla ĵurnalisto pri doktoro Schumacher. »Vi forĝegas,« li diris al mi, »ke li estas social-demokrato.« Mi ne forĝegas. Sed la angla kolego forĝesis, ke Schumacher estas »Bismarka« social-demokrato. Ke li vizitadis lernejon de la germana social-demokrato, kiu ĉe eksplodo de la unua mondmilito sin subigis al komando de imperiestro. Ilia gvidanto Ebert diris, ke li malamas socialan revolucion kiel peston. Lia unua faro en funkcio de regna kanceliero estis sekreta pakto kun germana militarismo. Ĉe li lernis doktoro Schumacher malamon al efektiva socialismo. De la dua social-demokrata gvidanto germana Severing li estas lerninta, ke la faroj ne devas respondi al la vortoj. Severing predikis demokration kaj armis ŝovinistajn bandojn.

La antaŭmilita germana social-demokrato subtenadis la tiel nomitan paneŭropan union. Hitler

estis ankaŭ por Eŭropa unueco sub germana komando. Antaŭ kelkaj monatoj reprenis devizon de Paneŭropo Winston Churchill kaj deklaris, ke ĝi devas bazi sur germana-franca amikeco. Li ne permesis dubi, ke Paneŭropo estas sole alia vorto por malamikeco kontraŭ la Sovet-unio. Nun Schumacher dum sia vizito en Londono envicigis sin en Churchill-ligon kontraŭ bolŝevismo.

Kiel la malnova same ankaŭ la nova führer kalkulas kun malkonsentoj inter la aliancoj. Antaŭ nelonge estas dirinta unu eksministro de la Weimar-respubliko, ke la »venkitoj« havas por sia dispozo malmultajn armilojn, sed ke ili povas apogi sin sur fido al malkonkordo inter la venkintoj. Sur siaj publikaj manifestiĝoj doktoro Schumacher pri tiu malakordo ŝatas paroli. Kun bedaŭro. Ĉar li, laŭ si, nenion pli deziras, ol unuecon inter la aliancoj. Li deziras ĝin tiel, kiel ĝin deziris Hitler kaj antaŭ ĝi germana imperiestro kaj ankoraŭ pli frue Bismark. Politiko Bismarka bazis sur eterna tenado de malakordo inter oriento kaj okcidento. Tiel kaj ekskluzive tiel povis Germanio fariĝi decidanto pri sorto de Eŭropo. Schumacher, kies megalomanio estas la sama kiel tiu de Hitler, jam vidas sin en rolo de decidanto pri Eŭropo-historio.

Kiun Dio volas pereigi, tiun li afliktas per blindeco. Ofte per blindeco de malamo al Sovet-unio. Se vi pli akre rigardos la fremdlandajn Schumacher-protektorojn, kiuj pri li asertas, ke li estas prototipo de nova Germanio, vi rimarkas, ke ili apartenas plej ofte al la malnova München-gvardio. Estas inter ili ankaŭ homoj kredantaj je »misio de doktoro Schumacher«. Sed ili estos tiel seniluziigitaj kiel tiuj, kiuj iam kredis je promesoj de Hitler. Se Schumacher estas efektive protagonisto de demokratio, kial al li historie aplaudas en kunvenoj la homoj, kiuj antaŭ malmultaj jaroj same historie aplaudadis, kiam al ili parolis en »Sportpalast« Hitler? Se doktoro Schumacher estas protagonisto de demokratio kaj paco, kial do laŭdas lin germanaj industriistoj, se ili estas inter si? Magnatoj en Ruhrlando kolektadis monon por Hitler, ĉar ili esperis de li, ke li liberigos ilin de sindikatoj kaj de laborista movado kaj ke li certigos al ili grasajn kontraktojn por armado kaj grandan militakiraĵon. Magnatoj en Ruhrlando ne estas bonfarantoj. Kial ili do, kiel informas kredinda sciigo, kolektas nun monon por la politika laboro de doktoro Schumacher?

Nova ratkaptisto en Germanio sonĝas pri milito de rekompenco. Tial la magnatoj en Ruhrlando kolektas monon por lia politika laboro.

Tradukis Stan. Kamarýt.

## Ota Ginz: Esperantisto ekster sia lando

Vojaĝoj al fremdaj landoj estas ĉiam ankoraŭ malfacilaj. Ne sole pro la necesa monsumo, kiu estas kelkoble pli alta kompare kun la kosto antaŭ la milito, sed ankaŭ pro la pena havigo

de ĉiuj postulataj dokumentoj. Niaj kaj ĉiulandaj oficoj en konkordo zorgas, ke oni ne tro multe vojaĝu pro plezuro.

Tio nin esperantistojn precipe forte tuŝas.

Multaj el ni sentas ĉiam vivan deziron ankaŭ proksime interrilati kun samideanoj de aliaj landoj. Tiu deziro nun intensiĝis kaj fariĝis preskaŭ bezono. Tro longajn jarojn mankis al ni persona rilato, ni ŝategus premi denove la manon de niaj malnovaj amikoj eksterlande, paroli kun ili pri ĉio travivita kaj akiri amikojn novajn. Jam dum pli ol unu jaro ni interŝanĝis ja leterojn, sed nelonga buŝa intertrakto gvidos pli rapide al celo ol senfina korespondado.

Ni devas esperi, ke tiu situacio almenaŭ iom pliboniĝos dum proksima tempo kaj ke pluraj el ni havos la eblon viziti la nunjaran kongreson en Bern.

Se ni en Praha havis dum la jaro 1946 tamen plurfoje okazon renkonti samideanojn alinaciajn, ĝi okazis sole pro tio, ke esperantistoj vojaĝantaj pro sia profesio en eksterlandon, uzis siajn liberajn momentojn por renkonto kun ni.

Mi faris same, kiam mi estis sendita de mia entrepreno al Anglio kaj Francio. Mi serĉis esperantistojn pro mia nerostiĝanta amo al nia lingvo kaj krome pro bezono. Laborante dum multaj jaroj en industria entrepreno, mi plurfoje spertis, kion signifas fidinda helpo samideana. Ni havis bonajn komercajn rilatojn, proprajn reprezentantojn kaj subtenon de niaj konsuloj kaj mi tamen trovis plurfoje utila serĉi apogon ĉe esperantistoj. Mi ĉiam memoros la valoregan helpon, kiun al mi prezentis mia neforgesebla amiko Harabagiŭ, ĉefdelegito de U. E. A. en Bucuresti.

La vojaĝo al Londono estis simpla. Flugante tien, mi ne havis kaj ne serĉis okazon halti survoje. Post kvarhora seninterrompa kaj plej agrabla flugo mi alvenis kaj jam en la urba celstacio de la flugpasajeroj, la impona palaco Airways Terminal, min atendis mia malnova amiko samideano H. Moy Thomas, malgraŭ siaj 82 jaroj ĉiam ankoraŭ agema delegito. Li plurfoje vizitis ankaŭ nian urbon kaj ni ŝatis aŭskulti lian ĉarman kanton alkitaran. Nun li kondukis min al sia londona domo kaj ne permesis, ke mi serĉu alian loĝejon malgraŭ mia resto preskaŭ dusemana. Ne helpis mia konvena atentigo pri la ĉeĥa (eble ankaŭ alinacia?) proverbo, laŭ kiu „Gasto kaj fiŝo ne plu estas ŝatinda la trian tagon.“ (En originalo estas uzata pli forta esprimo.)

Centro por vilaĝaj vizitantoj al Praha estas la placo Václavské náměstí. De tie ili serĉas kaj ofte trovas la ceterajn lokojn en la urbo. Mi agis laŭ tiu bona vilaĝana kutimo en Londono, tamen kreante por mi pliajn tiajn centrojn: Trafalgar Square (la bela placo kun Nelsonmonumento en la mezo), Marble Arch (marmora pordego ĉe unu rando de la ĝardeno Hyde Park) k. a. kaj mi lernis sufiĉe rapide per helpo de tramoj sur- kaj subteraj kaj de aŭtobusoj tolereble min movi tra tiu neimageble granda urbo.

Tamen ne ĉiam helpis mia lerto kaj kiam mi devis plenumi mian ampleksan laborplanon, mi trovis utile serĉi esperantistan helpon. Liberigis sin pro mi de sia laboro s-ano William Vincent,

samideano plej helpema kaj en ĉiu rilato perfekta. Antaŭ jaroj ni havis interesan kunvenon en Praha, kiam li alvenis al internacia skolta renkonto. Nun mi povis klare konstati la amplekson de laboro, kiun mi neniam estus povinta plenumi sen lia lertega akompano, kiam ni kvazaŭ flugis de unu transportrimedo al alia tra la londonaj stratoj.

Nian nacian festotagon la 28-an de oktobro mi pasigis en Londono. Memorante tion, mi proponis al la londona Esperanto-klubo prezenti dum ĝia kunveno la 25-an de oktobro mallongan paroladon pri nia respubliko. Miaj vortoj estis amike akceptitaj de multnombraj kunvenintoj en la larĝa halo Fred Tallant kaj la filmo, kiun mi tie projekciis, estis ŝajne kun intereso rigardata. Mi traktis pri la preparo kun s-ano Holmes, vicprezidantino de la klubo, en la klubejo mem mi renkontis ankaŭ s-inon Holmes, ŝian edzon kaj prezidanton. La geedza paro gvidas sukcese tiun fortan klubon, havantan 200 membrojn. Post la parolado ŝatis akcepti la aŭskultintoj kelkajn propagandajn presajojn pri Ĉeĥoslovakujo, kiujn mi povis alporti.

Tiam mi havis okazon interparoli kun pluraj plej simpatiaj samideanoj britaj. Inter ilin mi devas kalkuli ankaŭ s-aninon Sophie Crolenbaum. Ŝi vere ne multe ŝanĝiĝis, ĉiam tutsame ŝi scias ridi kaj tamen pasis pli ol 25 jaroj, kiam mi al ŝi, tiam fraŭlino Zofie Davidová, en Praha en la jaro 1921 antaŭ la Esperanto-Kongreso, instruis esperanton. Estis agrablega vespero, kiun mi pasigis kun ŝi kaj ŝia edzo, la klera kaj sprita s-ano Crolenbaum. La samideanino ne forgesis dum la multaj jaroj sian lingvon gepatran. Kiam ni interŝanĝis kelkajn vortojn ĉe ĥajn en restoracio, proksimiĝis neesperantista gasto, prezentis sin kiel greko kaj post nia respondo, ke ni parolis la lingvon ĉehan, tre simpatie akceptis tiun klarigon deklarante, ke li ŝatas nin kiel ortodoksulojn el najbara Jugoslavujo. Mi ne povus kalkuli samideanojn, kun kiuj mi povis min interese amuzi en la klubejo, tamen mi citu almenaŭ kelkajn nomojn:

Jen mia afabla »patrono« s-ano J. Farraud, kiu zorgis pri kontinuo de mia IEL-membreco, la gaja s-ano Chipperfield sendanta sian saluton al s-ano Vondroušek (mi instruis ŝin ĝuste prononci tiun nomon), s-ano Willcocks, kiu petis min transdoni sian saluton al s-ano Rylček el Hradec Králové, s-ano Epton rememoranta s-anojn Geryk kaj d-ron Kamarýt. Per tiuj ĉi linioj mi plenumas mian promeson paroli hejme pri nia renkonto. Kun dr-o Mildwurf mi ankaŭ parolis kaj mi tre bedaŭras, ke mi ne povis dediĉi pli da momentoj al li.

Kun s-ano Wilkinson, sekretario de Brita Esperanto-Asocio, mi interkonsentis rendevuon en la ejo de B. E. A., situanta en ĝia propra domo. Enestas librovendejo kaj oficejo. Tie mi revidis post multaj jaroj denove s-anojn Cecil C. Goldsmith, longjaran gvidanton de I. E. L., iom grizetan, sed ĉiam plej viglan kaj aktivan en parolo kaj ago. Oni ne povas resti netuŝita revidante tiun viron, kiu portis sen laco nian

standardon ankaŭ dum tagoj tre malfacilaj. Oni rememoras la diversajn malinterkonsentojn pri la organizaj demandoj kaj oni havas la impreson, ke multo progresus pli glate, se estus eblaj pli oftaj personaj renkontiĝoj. Lastatempe ili ja okazis inter reprezentantoj de U. E. A. kaj de I. E. L. kaj ni esperu, ke rezulto estos la sopirata unueca granda kaj forta organizo de la tutmonda esperantistaro.

S-ano Wilkinson proponis sin plej serveme plenumi por mi ankaŭ plurajn nefacilajn privatajn aferojn.

Vera ĝuo estis por mi vizito al s-ano C. B. Fawcett en lia bela hejmo. Li ŝatis rememori niajn komunajn antaŭmilitajn promenojn tra Praha kaj li sciis prezenti plej interese siajn multajn spertojn pri landoj kaj popoloj plej forraj. Tiu vizito, dum kiu li, s-ino Fawcett kaj ilia ĉarma filino faris sian eblon por agrablighi la kuneston, lasis en mi plej fortan impreson pri la alte ŝatinda tipe brita gastamo. Tiu ĉi nia eminenta amiko, profesoro de geografio en la Londona universitato, uzas siajn valorajn rilatojn (al UNESCO ktp.) por utili al nia afero.

Mi fine devas mencii ankaŭ la bonajn servojn de la komerca delegito s-ano Alvarez, sincere klopodinta helpi min.

Mi revenis hejmen per trajno tra Francio.

Parizo por mi signifis revidon kun mia amiko Aisberg, jam antaŭe kaj nun des pli fama fakulo pri radio (aŭtoro de la unika esperanta verko: Fine mi komprenas la radion!), kiu sukcesis sin forsavi for de la fera kalkanumo malamika. Li gvidas nun grandan teknikan eldonejon, ĉefredaktas radiorevuon, verkas brilajn verkojn fakajn kaj tamen trovas tempon por dediĉi sin ankaŭ al sia juna edzino kaj al sia aminda filino, la malgranda Katarina. Sed li forlasis ĉion dum la tri tagoj kaj ni babilis vagante tra bela Parizo. Ĉiam novajn temojn trovante ni daŭrigadis en lia hejmeca domo ĝis malfruaj vesperoj. Mi konfesas, ke mi nun, akompanate de familio Aisberg, ĝuis tiun urbon multe pli ol dum nia dektaga resto dumkongresa.

Ne malutilas denove rememorigi al si, kiom da agrablo kaj da utilo alportas scio de esperanto, se ni vojaĝas tra fremdaj landoj.

Komparu: Vojaĝanta neesperantisto, eĉ se li majstras la lingvon de la vizitata lando, devas regule kontentiĝi per rilato al la hotelaj pordistoj kaj kelneroj. La popolo de la lando restas por li fremda, li taksas ĝin juĝante erare laŭ la prave mokataj aŭ timindaj profesiaj fremdulgvidistoj kaj la hotela personaro.

Ni ĉi tion scias kaj nia tasko estas instrui ĝin al la neesperantista mondo.

Karolo Piĉ:

## LA POETO

*Mi estas stranga pilgrimant';  
Mistonas mia akra kant',  
Kaj zumas ĝi samkiel knar',  
Kiam mi kantas ĉe ŝtupar'  
Fremdula.*

*Kaj kantas mi pri l' viv' kaj mort',  
Pri l' ŝanĝiĝema homa sort',  
Pri l' ŝip', maŝino, aŭto, tank',  
Aŭ pri l' printempa neĝoblank'  
Betula.*

*Kaj kantas mi pri l'am' kaj sent',  
Kaj pri l' somera varma vent',  
Sed plu jen sangas mia kor' ...  
Do mi foriras sub angor'  
Solula.*

Raymond Schwartz (Parizo):

## LA GASTEJO ĈE L' VOJRANDO

(Deklamita de aŭtoro en Radio-Praha)

*En la ombro de tilioj  
domo staras ĉe l' vojrando;  
Taŭga nest' por idilioj  
aŭ simila kontrabando.*

*Kaj pli forte ol la ŝildo  
kun invit' de gastejestro  
logis min agrabla bildo  
de fraŭlino ĉe l' fenestro.*

*Ŝi ridetis, — mi eniris,  
(ĉiam min rideto tuŝas!)  
dum la ŝildo stulte diris:  
»Oni trinkas, manĝas, kuŝas.«*

*»He, fraŭlino!« mi komencas,  
»portu kruĉon tien ĉi!«  
Sed la patro tuj sentencis:  
»Pri trinkaĵoj zorgas mi.«*

*Ŝi ridetis kaj silentis;  
glason trinkis mi post glas',  
sed ankoraŭ ne prezentis  
sin konversaci-okaz'.*

*»He, fraŭlino!« mi proponis,  
»portu supon tien ĉi!«  
Sed el ie voĉo sonis:  
»Pri manĝaĵoj zorgas mi!«*

*La patrino tre atable  
montris sian kuirarton  
kaj retenis min ĉetable  
la pli longan vesperparton,*

*tiel, ke mi fine petis:  
»Kie kuŝi tie ĉi?«  
Tiam la fraŭlin' ridetis:  
»Pri la ĉambroj zorgas mi.«*

*Pasis jaroj. — La fraŭlino,  
kiu ridis ĉe l' fenestro,  
estas nun por mi edziĝo,  
kaj mi mem — la gastejestro.*

*Kia dibenita tasko  
estas, en gastejo regi,  
por dediĉi sin al gasto,  
kaj lin varti kaj lin flegi!*

*Sciu, se ĝis nia lando  
vin la migrofebros puŝas,  
ke en domo ĉe l' vojrandoj  
oni trinkas, manĝas, kuŝas«;*

*Ĉio restis laŭ arango  
de konata tradici'  
kun nur unu — eta — ŝanĝo:  
Nun, pri ĉambroj zorgas... mi!*

## KRONIKO ENLANDA

**Ministerio de instruado kaj klerigo** respondis al nia letero el 5-a de julio 1946 per dekreto el la 6-a de decembro 1946 n-ro A-231.820/46-IVa/1, kiu diras, ke provizore, dum la tuta instruado devas celi riparon de malbonaĵoj kaŭzitaĵoj de la okupacio ne estas eble trakti pri enkonduko de novaj fakoj, eĉ ne laŭvolaj. La dua alineo diras:

»Sed Via sugesto estos pritraktata dum ellaborado de novaj definitivaj instruplanoj por komercaj lernejoj, kiuj estas enkondukotaj en unuajn jarojn komence de la lerneja jaro 1947/1948.«

Ni konfirmis la dekreton per nia letero el 18-a de januaro 1947 kaj prezentis niajn du fakulojn por inviti ilin al enketo kiel ekspertizistojn.

**Regionaj perantoj** funkcias jam en ĉiuj sidejoj de ĉeĥaj regionoj. Ilia laboro disvolviĝas kontentige, precipe en kelkaj urboj signifis starigo de peranto ekeston de nova esperantista vivo. Generala sekretario Boh. Paleček, kiu mem gvidas tiun ĉi fakon organizan, dissendis la 14-an de decembro al regionaj perantoj jam la 4-an cirkuleron, informan kaj instigan. Krom aliaj aferoj la cirkulero rekomendas baldaŭ starigi perantojn distriktajn. La perantoj akceptu nian dankon pro sindono, kiun ili dediĉas al organizaj taskoj. Koresponde ili turnu sin senpere al ĝenerala sekretario Bohumil Paleček en Praha II, Podskalská 49. — Perantoj en Ostrava, Olomouc, Hradec Králové komencis eldoni ciklostilitajn informilojn, por esti en kontakto kun ĉiuj membroj.

**Skriba kurso de la internacia lingvo Esperanto** en 10 partoj, verkata de Jan kaj Karel Filip, komencis aperadi. La unua, dua kaj tria partoj, bele ciklostilitaj sur po 8 paĝoj, aperis kaj estas je dispono de interesantoj. Estas enkondukitaj de citaĵoj de papo Pio X, prezidento Beneš, rusa verkisto L. N. Tolstoj, tutmonda estrino de skoltinoj Olave Baden-Powel. Atentigu pri ĝi ĉiujn, kiuj volas komenci per lernado. Instigu ilin anonci sin ĉe direkcio de la Skriba kurso de E. en Praha, Břevnov, Bělohorská 514.

**Amuz- kaj letervespero en Olomouc.** Esperantista societo en Olomouc aranĝis en sia plenkla bela klubejo la 14-an de decembro 1946 por siaj membroj kaj invititaj gastoj (sume 52 p.) amuz- kaj letervesperon je la memoro de naskiĝtago de dro L. L. Zamenhof. La letervespero estis anoncita en »Esperantista«, »Esperanto Internacia« kaj per radio Praha kaj Ostrava. Programo estis serioza kaj amuza. La serioza

parto enhavis: prezentadon, himnojn, recitadojn kaj legadon de alvenintaj leteroj. Krom el ĈSR (15) alvenis el Nederlando 9, Belgio 2, Anglujo 6, Francujo 6, Danlando 2, Jugoslavio 3, Polujo 2, Germanujo (angla oficiro) 1, Svedlando 2, Finnlando 1, Bulgario 1, Hungario 1, Trieste 1, entute el 14 landoj 51 leteroj kaj kartoĵoj kaj 1 telegramo. La plej interesaj leteroj estos rekompencaj per esperantaj libroj, la nomojn ni sciigos en la venonta numero. La amuza parto konsistis el kantoj, recitadoj, tragedio, ŝercoj ktp. Dum la programo prezentis la sinjorinoj teon kun desertoj. La vespero, kiu tre plaĉis precipe al la gastoj el Prostějov, Přerov, Brno, Šternberk, Litovel kaj aliaj lokoj, finiĝis per danco.

**Regiona kunveno en Olomouc.** La 15-an de decembro 1946 okazis en Olomouc kunveno de la XVI-a regiono. La partoprenantojn salutis flagoj ŝtata kaj esperanta. Krom esperantistoj ĉestis reprezentantoj de Centra nacia komitato de Olomouc vicurbestro sro Novotný kaj por la Distrikta nacia komitato Olomouc-ekstera la distrikta kleriga inspektoro sinjoro V. Rýznar. Ambaŭ salutis la kunvenon tre kore kaj promesis subtenon de la movado. Precipe la parolado de sinjoro Rýznar estis akceptita kun granda aplaŭdo. Li diris, ke la teknikaj eltrovaĵoj plifaciligas interrilatojn de la tuta mondo, sed la reciprokaj interkomprenon malhelpas la cirkonstanco, ke la homoj sin ne komprenas. Lernado de multaj lingvoj estas multekosta kaj neekonomia. Per forigo de tiuj ĉi malfacilaĵoj kaj enkonduko de unu internacia lingvo, kia estas esperanto, la kaŭzoj de la militoj malaperos per si mem.

Poste en la diskutado partoprenis multaj esperantaj kaj ĉeĥaj paroladoj. Sro Jeřábek el Prostějov parolis pri dro Zamenhof. Regiona peranto sro Blažek atentigis pri la disvastiĝo de la germana lingvo en Eŭropo kaj proklamis la devizon: germana lingvo aŭ esperanto. Grava estas la dekreto de la ministerio por lernejoj, kiu intencas subteni fondadon de esperantaj rondetoj kaj gvidadon de esperanto-kursoj. Ni uzu la okazon! Redaktoro de Našinec sro P. Pokorný parolis pri uzo de esperanto en koncentrejoj. Prezidento de Esperantista societo en Olomouc sro dro Mohapl akcentis, ke ne nur ĉiuj esperantistoj, sed ankaŭ ĉiuj amikoj de E. devas esti organizitaj. La venko de esperanto estas certa, ĝi estas nur afero de tempo, kaj ni devas klopodi, ke ĝi fariĝu plej baldaŭ.

La plej grava punkto estis aprobo de la rezolucioj al la ministerioj de lernejoj, de transportoj kaj de poŝto, per kiuj oni postulas enkonduki esperanton tien, kie oni ĝis nun uzis la germanan lingvon. ĈSR kuŝas sur vojkruciĝoj de Eŭropo, ĝi estas kaj estos celo de gastoj el la plej diversaj nacioj. La fervojisto el Olomouc tradukis en esperanton »Internaciajn konvenciojn pri fervojaj person-, pakaj- kaj fretaj-trafikoj« kaj klasifikon de la komercaĵoj. La enhavo de la rezolucioj estis trafe argumentita.

Honora prezidanto sro Neužil raportis pri sia refuto al la artikolo de prof. Trávníček en Svobodné noviny. La gazeto ne publikigis lian respondon. Poste s-ino Kubová recitis la poemon »Nun aŭ neniam« (el Heroldo). Sekvis transdono de donacitaj libroj, destinitaj por la fondataj bibliotekoj en la limregiono. Ankaŭ estis forsendita petskribo al ĉs. radio por disaŭdigo de esperantaj kursoj. Dum vigla debato estis pritraktata la neceso de plej baldaŭa eldono de esperantaj vortaroj; estis proponite fondi eldonkompanion.

La programriĉa kunveno finiĝis per himnoj, fotografado kaj komuna tagmanĝo. La kunvenaj traktadoj havis tre altan nivelon kaj vekis certe ĉe la neesperantista publiko grandan intereson. Ĉiuj 5 tagĵurnaloj de Olomouc alportis longajn kaj tre favorajn raportojn. Ĉeestis sume 50 p.

**Jarkunveno de la laborista esperantista societo KULTURO** okazis la 9-an de januaro 1947 en Plzeň. Pro translokiĝo de prezidanto kaj neĉeesto de vicprezidanto malfermis la kunvenon k-do Kalný, bonvenigante pli ol tridek gesamideanojn k. delegitojn de kelkaj E-kluboj kaj delegiton prezidanton de societo »Amikoj de dem. Hispanio«. Post aprobo de protokolo el pasinta jarkunveno prezentis k-do Jos. Patera trikvoron-horan paroladon pri lab. tutmonda esperantista organizado kaj ĉefe atentigis pri la signifo kaj valoro de la mondorganizo Sennacieca Asocio Tutmonda. Post parolado sekvis raportoj de funkciuloj, el kiuj oni povas ekkoni la grandan aktivecon de plzeňaj laboristaj esperantistoj. Ni notas la plej gravajn okazintaĵojn: Estis helpe de KULTURO efektiviĝitaj 4 Esp.-kursoj sub gvidado de k-do Reiser, Jos. Patera kaj Kalný, unu amuz-kultura vespereto kaj la tago de libro en Měšťanská beseda, kies programon prizorgis ĉefe la anoj de KULTURO kaj la kursanoj. Estis aranĝitaj ĉiujaŭde konversaci-vesperoj, kie samideanoj povis aŭdi paroladojn pri diversaj temoj. El la parolintoj ni citas: K-do Valeš el Praha, k-do Pelcman, Kalný kaj Josef Patera el Plzeň. Societajn entreprenojn vizitis entute 82 personoj. Plej granda nombro de vizitintoj estis 56, la plej malgranda 4. Regule kunvenadis 15 gekamaradoj. Plej ofte ĉeestis k-do Patera juna, tuj post li sekvas k-do Fremr, Kalný, Patera maljuna, Proskovec, Reiser ktp.

El fakoj, starigitaj en pasinta jarkunveno (propagand-fako, virin-fako kaj junular-fako) estis aktiva nur la unue nomita. El ĝia raporto ni citas jenon: Estis eldonitaj 3000 flugfolioj »Cely svět se zajímá o Československo«, 30 grandaj

desegnitaj afiŝoj en grandeco 60×40 cm, kiuj estas vere bonegaj propagandiloj. Al plzeňaj gazetoj estis senditaj kaj presitaj entute 46 artikoloj aŭ anoncoj pri Esperanto aŭ pri E-entreprenejoj. El tio du artikoloj el SENNACIULO »La pacemaj nacioj« kaj »Kiom da lingvoj ekzistas en la tuta mondo«.

Dum la jaro estis ricevitaj 48 leteroj kaj forsenditaj 195 leteroj.

Kiel novaj reprezentantoj de la lab. esperantista societo KULTURO estis elektitaj jenaj gek-do: Prezidanto Kalný, vicprezidanto Proskovec, sekretario Josef Patera, protokolisto Reiser, kasisto Fremr, bibliotekisto Třeška, revizoroj Fr. Novák kaj k-ino Folková, komitatanoj Hes, Frant. Patera, Kroupa, ing. Rudolf Novák kaj k-ino Kalná. Estis fondita la SAT-kongresfondado, por kiu donacis k-do František Patera 1000.— Ĉĉs, kaj la redakta komisiono el jenaj kamaradoj: Josef Patera, Hes, Reiser, sub ĉefgvidanto k-do Kalný.

Estis aprobita la propono pri translokiĝo de societa ejo en la ĉambroj de domo KULTURA en Plzeň, Gorkého 1. La semajnaj kunvenoj okazos de nun ĉiam merkrede je la 7.30 vespere en la domo KULTURA, ĉambro numero 2.

**La regionan kunvenon de distriktaj perantoj en Mladá Boleslav (III-a reg.)** partoprenis sabatvespere la 25-an de januaro entute 53 kaj dimanĉe la 26-an 39 personoj. Rezentitaj estis lokoj: Ml. Boleslav, Turnov, Praha, Dobrovice, Sobotka, Doksy, Žerčice, Hradec Král., Debř, Kosmonosy, Mnich. Hradiště, Domousnice, Husí Lhota, Česká Skalice. Sabatvespere estis amuzvespero. Partoprenantojn bonvenigis s-ano K. Šolc kaj poste reprezentantoj de diversaj grupoj uzis la okazon por saluti la ĉeestantajn gesamideanojn. Parolis s-ano Šustr, PhDr. Pítlík, Slanina, Špúr, Pytloun, Asocia prezidanto s-ano Malík, prof. Kožený, Blažek, Pabiška kaj aliaj. Sabata vespero estis kvazaŭ renkontiĝo de Doksanoj. Ni ĝuis el partopreno de niaj karaj gastoj el Praha, pro ĉeesto de nia espo-patrino el Doksy s-ino Bendová, f-inoj Boháčková, Hejná, gesinoroj Balda ktp. Hradecanoj estas same niaj plej fidelaj subtenantoj. Sen samideano Pytloun oni malfacile prezentus al si ian konferencon. Li estas en Hradec, tamen li estas la nia. Post mallonga paŭzo kantis fraŭlino R. Zachová du ariojn el operoj de V. Blodek kaj Georges Bizet. Ni deziras aŭdi s-aninon Zachová baldaŭ antaŭ la mikrofono en Praha. S-ano Šimon, kiu donis al si grandan laboron per traduko de tekstoj el Smetana-operoj faris vere utilan laboron. Pianon ludis Sitová. S-ano Moucha recitis la poemon »Al la Fratoj«. S-anino Valešová el Turnov deklamis poemon »Mi scias«. Poste oni rakontis anekdotojn. Ni sidis ĝis noktomezo, kvankam la salono estis malbone hejtita.

La 26-an dimanĉe je la 9-a horo antaŭtagmeze s-ano Šolc malfermis laborkonferencon kaj klarigis la nunan laborstrukturon de E. A. en ĈSR al ĉeestantaj distriktaj kaj lokaj perantoj. Li parolis plue pri instruado de E. kaj sciigis, ke li kun s-ano Vrba preparas liston de ĉeoslava-

kaj komercistoj-ĉesperantistoj. Tiu listo certe vekos intereson en rondoj komercistaj kaj helpos al praktika uzo de nia lingvo.


Komercistoj petu de li informon. Estas plue tuŝataj problemoj de moderna propagando kaj stacidomaj tabuloj. Ili estas riceveblaj ĉe s-ano Ŝustr kaj kostas Kčs 100.—. Estas plue pritraktata afero, ĉu Turnov restu ĉe regiono Liberec aŭ transiru en la trian regionon, ĉar Turnovanoj ĉiam kunlaboris kun Boleslavanoj kaj ĉiuj entreprenoj estis komunaj. Ni lasis al Turnovanoj eblecon libere decidi, ĉar finfine egalas kien ili volos iri, ĉar esperantistoj ili tamen restos. S-ano Pytloun traktas pri diversaj aferoj organizaj kaj proponas al asocio multe pli belajn atestojn. S-ano prezidanto Malik parolas ĝenerale pri situacio en la movado kaj klarigas al ni la situacion en slovakia parto de nia ŝtato. Plue li raportas pri lia interparolo kun sinjoro ministro Kopecký kaj informas nin pri kongreso

en Berno. Oni proponas, ke s-ano Pytloun akceptu la funkcion de Lo-pe. Ni esperantistoj certe ĝojus se samideano Pytloun akceptus tiun funkcion. S-ano Slanina raportas pri radiodis-aŭdigoj, kaj kun Ŝpŭr oni traktas pri la situacio de espo-hotelo en Doksy. Tiu hotelo ne taŭgas laŭ liaj diroj por niaj celoj. S-ano Malik plue parolas pri la nova linio de espo-movado. PhDr. Pitlík alplenigas lian parolon. S-ano dr. Eulidraketo el Česká Skalice alportas ne sole salutojn de esperantistaro, sed li estas kiel reprezentanto de L. N. K. kaj proponas Česká Skalice kiel restadejon esperantistan. Bedaŭrinde la tempo rapide pasas kaj tial ni devas interrompi la kunsidon 30 minutojn post la tagmezo. Sekvas komuna fotografado antaŭ la hotelo. Posttagmeze je la 2-a horo okazis aparta kunsido de prepar-kursa komitato kaj laŭ decido en tiu kunveno ni povas anonci al ĉiuj, ke la kursojn en Doksy ni efektivigos ankaŭ ĉijare. La instruprogramo estos pli riĉa kaj ekfunkcios seminario. Novaĵo estos ankaŭ kurso pri komerca reklamo. La kursoj en Doksy komencos lastan semajnon en monato julio kaj finos la unuan semajnon en aŭgusto.

**Oficiala instruado en burĝa lernejo en Klenovec.** Komisiito por instruado kaj klerigo per dekreto el 4-a oktobro 1946 n-ro 99.059/46-A-II/1 permesis, ke en la ŝtata burĝa lernejo en Klenovec estu en la lernejjaro 1946/47 instruata esperanto kiel laŭvola fako en unu klaso po unu horo semajne kun rajto al honorario, supozante, ke estas plenumitaj kondiĉoj de dekreto n-ro 15/46 Sb. n. SNR parto tria alineo VII/2. Suma nombro de horoj en semajno ne rajtas superi 36 ĉe studento kaj 37 ĉe studentino. La direktoro de la lernejo s-o Ján Majerský, kiu instruas esperanton en sia lernejo, akceptu nian dankon

kaj gratulon. Li eduku el siaj lernantoj bonajn samideanojn kaj diru al ili niajn salutojn!

**Subskriboj de ĉeĥaj eminentuloj sur petskribo al UNO.** Dank' al persista laboro de nia komitato Th. Kilián subskribis inter aliaj parlamentanoj la petskribon deputito Antonín Zápotocký,



prezidanto de Centra Estraro de Sindikatoj, prezidanto de la parlamento Josef David, ministro por industrio Bohumil Laušman, prezidanto de la Internacia Partizana Asocio univ. prof. d-ro Josef Grňa kaj lia moŝto ĉefepiskopo en Praha d-ro Josef Beran. Ili ĉiuj ricevu pro sia larĝvida sinteno al nia celado dankon kaj esprimon de nia admiro.

**Artikolo de prof. Trávníček, kontraŭ kiu ni polemikis en nia 9-a numero de pasinta jarkolekto, havis vastan resonon inter nia membraro.** Svobodné noviny ricevis plurajn refutantajn polemikojn. Laŭ nia scio sendis al ilia redakcio protestajn kaj kritikantajn artikolojn prof. J. Kožený, lernejestro A. Nežil, profesoro T. Kilián. La redakcio nenion el tio publikigis, ĝi ankaŭ ne konfirmis al ni sendon de nia numero 9-a nek prof. Trávníček respondis nian leteron kaj nian artikolon. Tamen respondo al li signifis gravan faron kaj ni tre dankas al ĉiuj samideanoj, kiuj ne silentis. Fako estas, ke de post tiu dato redakcio de Svobodné noviny plurfoje pozitive aludis esperanton kaj publikigis plurajn simpatiajn artikolojn. Inter aliaj la redakcio enpresis alvokon de s-o Rauvolf pri interŝanĝo de infanoj. Kaj la fakto mem, ke la redakcio ricevis kritikojn, signifas por la redaktoroj pruvon, ke nia movado vivas efektive. Tial ankoraŭ foje: dankon samideanoj!

**En ĉeĥa revuo por parapsikologio Psychická revue en 9-a numero el 1946 aperis artikolo de St. Staňura, kiu klarigas signifon de esperanto por esploro en parapsikologia sfero.** Ĝi enhavas nomaron de lokoj, en kiuj estas fakdelegitoj el fakoj, kiuj interesas la parapsikologiajn esplorantojn. Tiu ĉi iniciato estas rimarkinda kaj ni atentigas pri tiu ĉi revuo ankaŭ niajn legantojn.



kaj komercistoj-esperantistoj. Tiu listo certe vekos intereson en rondoj komercistaj kaj helpos al praktika uzo de nia lingvo.


Komercistoj petu de li informon. Estas plue tuŝataj problemoj de moderna propagando kaj stacidomaj tabuloj. Ili estas riceveblaj ĉe s-ano Ŝustr kaj kostas Kčs 100.—. Estas plue pritraktata afero, ĉu Turnov restu ĉe regiono Liberec aŭ transiru en la trian regionon, ĉar Turnovanoj ĉiam kunlaboris kun Boleslavo kaj ĉiuj entreprenoj estis komunaj. Ni lasis al Turnovanoj eblecon libere decidi, ĉar finfine egalas kien ili volos iri, ĉar esperantistoj ili tamen restos. S-ano Pytloun traktas pri diversaj aferoj organizaj kaj proponas al asocio multe pli belajn atestojn. S-ano prezidento Malik parolas ĝenerale pri situacio en la movado kaj klarigas al ni la situacion en slovaka parto de nia ŝtato. Plue li raportas pri lia interparolo kun sinjoro ministro Kopecký kaj informas nin pri kongreso

en Berno. Oni proponas, ke s-ano Pytloun akceptu la funkcion de Lo-pe. Ni esperantistoj certe ĝojus se samideano Pytloun akceptus tiun funkcion. S-ano Slanina raportas pri radiodis-aŭdigoj, kaj kun ŝpŭr oni traktas pri la situacio de espo-hotelo en Doksy. Tiu hotelo ne taŭgas laŭ liaj diroj por niaj celoj. S-ano Malik plue parolas pri la nova linio de espo-movado. PhDr. Pitlík alplenigas lian parolon. S-ano dr. Euldraketo el Česká Skalice alportas ne sole salutojn de esperantistaro, sed li estas kiel reprezentanto de L. N. K. kaj proponas Česká Skalice kiel restadejon esperantistan. Bedaŭrinde la tempo rapide pasas kaj tial ni devas interrompi la kunsidon 30 minutojn post la tagmezo. Sekvas komuna fotografado antaŭ la hotelo. Posttagmeze je la 2-a horo okazis aparta kunsido de prepar-kursa komitato kaj laŭ decido en tiu kunveno ni povas anonci al ĉiuj, ke la kursojn en Doksy ni efektiviĝos ankaŭ ĉijare. La instruprogramo estos pli riĉa kaj ekfunkcios seminario. Novaĵo estos ankaŭ kurso pri komerca reklamo. La kursoj en Doksy komencos lastan semajnon en monato julio kaj finos la unuan semajnon en aŭgusto.

**Oficiala instruado en burĝa lernejo en Klenovec.** Komisiito por instruado kaj klerigo per dekreto el 4-a oktobro 1946 n-ro 99.059/46-A-II/1 permesis, ke en la ŝtata burĝa lernejo en Klenovec estu en la lernejjaro 1946/47 instruata esperanto kiel laŭvola fako en unu klaso po unu horo semajne kun rajto al honorario, supozante, ke estas plenumitaj kondiĉoj de dekreto n-ro 15/46 Sb. n. SNR parto tria alineo VII/2. Suma nombro de horoj en semajno ne rajtas superi 36 ĉe studanto kaj 37 ĉe studentino. La direktoro de la lernejo s-o Ján Majerský, kiu instruas esperanton en sia lernejo, akceptu nian dankon

kaj gratulon. Li eduku el siaj lernantoj bonajn samideanojn kaj diru al ili niajn salutojn!

**Subskriboj de ĉeĥaj eminentuloj sur petskribo al UNO.** Dank' al persista laboro de nia komitato Th. Kilián subskribis inter aliaj parlamentanoj la petskribon deputito Antonín Zápotocký,



prezidanto de Centra Estraro de Sindikatoj, prezidanto de la parlamento Josef David, ministro por industrio Bohumil Laušman, prezidanto de la Internacia Partizana Asocio univ. prof. d-ro Josef Grňa kaj lia moŝto ĉefepiskopo en Praha d-ro Josef Beran. Ili ĉiuj ricevu pro sia larĝvida sinteno al nia celado dankon kaj esprimon de nia admiro.

**Artikolo de prof. Trávníček,** kontraŭ kiu ni polemikis en nia 9-a numero de pasinta jarkolekto, havis vastan resonon inter nia membraro. Svobodné noviny ricevis plurajn refutantajn polemikojn. Laŭ nia scio sendis al ilia redakcio protestajn kaj kritikantajn artikolojn prof. J. Kožený, lernejestro A. Nežil, profesoro T. Kilián. La redakcio nenion el tio publikigis, ĝi ankaŭ ne konfirmis al ni sendon de nia numero 9-a nek prof. Trávníček respondis nian leteron kaj nian artikolon. Tamen respondo al li signifis gravan faron kaj ni tre dankas al ĉiuj samideanoj, kiuj ne silentis. Fako estas, ke de post tiu dato redakcio de Svobodné noviny plurfoje pozitive aludis esperanton kaj publikigis plurajn simpatiajn artikolojn. Inter aliaj la redakcio enpresis alvokon de s-o Rauvolf pri interŝanĝo de infanoj. Kaj la fakto mem, ke la redakcio ricevis kritikojn, signifas por la redaktoroj pruvon, ke nia movado vivas efektive. Tial ankoraŭ foje: dankon samideanoj!

**En ĉeĥa revuo por parapsikologio Psychická revue** en 9-a numero el 1946 aperis artikolo de St. Staňura, kiu klarigas signifon de esperanto por esploro en parapsikologia sfero. Ĝi enhavas nomaron de lokoj, en kiuj estas fakdelegitoj el fakoj, kiuj interesas la parapsikologiajn esplorantojn. Tiu ĉi iniciato estas rimarkinda kaj ni atentigas pri tiu ĉi revuo ankaŭ niajn legantojn.

## Samideano muzika komponisto Jaroslav Ježek

Estis agrabla, maja vespero antaŭ eble 20 jaroj. Sur la koridoroj, en la vestiblo, ja eĉ en iuj ĉambroj de la Klár-Instituto en Praha ankoraŭ loĝis la vintra malvarmo, sed tra la larĝe malfermita pordego alĝardena blavis freŝa, bonodora, varmeta vespera zefiro. La nevidanta ĝejnularo rapidis el siaj laborejoj al la manĝejo, starante multaj konsumis la tie atendantan vespermanĝon, multaj ŝtopis ĝin en siajn poŝojn kaj preskaŭ vetkuris al la ĝardeno por akiri sidlokon sur seĝoj, sur benkoj, ĉar estis nur limigita nombro da ili. Ĉi tie estis pli bone, ol inter la muroj de la domo.

„Ho ve, ĉio posedata jam de la uzurpuloj,” bedaŭris blonda knabino kun sia rondeto.

„Promenu, dum ni sidos, ni alternos kun vi poste,” refutis kaprice la knaboj nemovigante de la benko. Gaja rido, kantado, siringodoro...

Tiun vesperon estis en Klárov vigla movplena tumulto, kian oni vidis tie ĉi lastfoje nur dum kristnasko. Ankaŭ mi rapidas el la instituto, post prelego al knabina kurso de Esperanto. En la vestiblo mi renkontas konatan duopon, du nedisigblajn amikojn, anojn de kurso porknaba. Estas Jaroslav Ježek kaj Josef Škoda.\*

„Ha, ho, knaboj, ĉu vi ne iros eksteren?”

„Jes, ja estas vi, sinjoro instruisto; ni ĵus diskutas pri tio, sed la tumulto en la ĝardeno tute ne konvenas al ni!” — Kompreneble, iliaj seriozaj, profundaj temoj ne facile povis toleri la movadon kaj bruon regantan hodiaŭ en la ne tre vasta ĝardeno. Tie nur la nenature granda statuo de sankta Venceslao povis daŭrigi siajn meditojn kun kapo hodiaŭ ŝajne eĉ pli pacience klinita super la nekutima vivbruo.

„Ĉu do plaĉas al vi promeno en la stratoj? Mi kondukos vin bone, diru, kien vi volas marŝi!” — „Ho, grandan dankon, estas nenio pli bona ol akcepti, sed ĉu tio ne ĝenos vin, ĉu vi ne havas alian programon?” — „Preskaŭ mi havis. Mi deziris hodiaŭ revidi la riveron, la Ponton de Karolo, la Malgrandan Kvartalon, la karan Malnovan urbon...” — „Kiel bela programo, sinjoro E., prenu nin kun vi!” — „Do, ni ekmarŝu!” kaj ni ekiris al la rivero plaŭdanta nove en tiu ĉi printempa atmosfero, ni promenis sur la florbeda kajo apud la Parlamentejo (tiamaj); jen la monumento de Karolo la Kvara salutis nin kaj miaj kunuloj pacience aŭskultis mian rakontadon pri la de ni pasata ĉirkaŭaĵo, survoje al la Malnova ponto. Ilia pacienca aŭskultado longtempe fine ŝajnis al mi suspektinda. Mi evidente iom embarasiĝis, ektimante, ke mia parolo enuas la nevidantajn amikojn. Eble muzika temo estus estinta pli alloga por ambaŭ, la junaj geniuloj, sed kion pri tiu temo rakontu mi, muzika malspertulo? Hezite mi ekhaltis.

„Sinjoro instruisto, certe estas bele ĉie ĉi, kaj ni multon similan jam legis kaj aŭdis de aliaj; ankaŭ ni amas nian belan Praha, ni povos pri ĝi ekscii de aliaj ankoraŭ pli, sed nur vi povas rakonti al ni pri Esperanto. Ni petas, rakontu al ni, kiel estas la afero ĉirkaŭ tiu lingvo, kiun vi tiom pacience instruas al ni! Ne koleru, havu ankoraŭ paciencon al nia scivolo!”

„Ĉu vere vin interesas Esperanto, kiun vi devas lerni en via lernejo?” mi demandis preskaŭ surprizite, sed ankaŭ suspektante, ke ilia intereso estas nur ŝajna, nur por flati la fervoran instruanton de tiu lingvo.

„Ho, jes, ni estas tre scivolaj pri Esperanto. Ni kune jam ofte kaj multe pridiskutis ĝin kiel nekutiman fenomenon. Ni opinias, ke enkonduko de tia lingvo en la ĝeneralan mondon, ne nur en la blindulan, radike ŝanĝus multajn aspektojn de la vivo. Ni supozas, ke tio ne povas okazi baldaŭ, sed neniu diris al ni ĝis nun, kiaj estas la nunaj fazoj de la Esperanta praktikado, aŭ kion el siaj eblecoj jam atingis la Esperantomovado en tiu ĉi tempo. Kiel vivas vere la Esperantistoj, kion ili faras?”

Multaj demandoj, ampleksa, sed ne malfacila temo. — Ho, karuloj, vi implikis vin mem en la reton. Facile kaj kun multa memĝuo mi vortbildigis al ili kelkajn tre allogajn, tre konvinkigajn scenojn el nia vivo. Mi rakontis pri UEA, ĝia eminenta, funkcia mondorganizo, pri la kongresoj, niaj enlandaj laborkonferencoj, pri la

\* Nun muzikprofesoro en Libeň apud Jiĉín.

literaturo, poezio, pri la de mi ĉiam dorlotataj verkoj de Miloš Lukáš, pri ties majstraj tradukoj de naciaj kantoj, pri miaj eksterlandaj personaj kaj korespondantaj ĝeamikoj, pri Esperanto kiel la sola lingvo en la familio de mia angla amiko, patro de tri idoj parolantaj la lingvon denaske ktp.

Denove nur mi parolis, denove la du knaboj silente aŭskultis, Vltava akompanis per murmuroj mian prikantadon — kaj malfrue vespere ni adiaŭis unu la aliajn antaŭ la peza pordego de la Instituto de Klár.

De tiu vespero pasis multaj aliaj. Pacience mi instruis Esperanton plu, raportadis pri ĝia progresado, miaj kursanoj pacience aŭskultadis. Sekvis multaj printempoj kaj la vivo montris al ĉiu el ni alian vojon. Tamen ni renkontiĝadis. Kun Škoda pli ofte ol kun Ježek, sed kiam mi havis okazon por mallonge renkonti lin, mi nur povis admiri kaj gratuli lin pro liaj brilaj sukcesoj en lia studado ĉe la konservatorio, ĉar jam tiutempe multajn frapis lia eksterordinara talento por moderna kompona arto. Preskaŭ proteste li premis la manon kaj lia demando ĉiam estis pri Esperanto. Li estis dum longa tempo unu el la piej fidelaj abonantoj de mia blindulrevueto „Aŭroro”.

Kaj kiam la severa vivo englutis lin, kiam la gloro forprenis lin komplete el nia rondo, ofte mi demandis min mem, ĉu Jaroslav Ježek forgesis Esperanton — aŭ ĉu mi iam denove havos okazon rememorigi al li lian apartenon al nia familia rondo.

Ho ve, la fatol — Tiu okazo neniam plu revenos.

5. I. 1947

Vuk Ehtner

## ESPERANTISTA VIVO

Nia komitato Jaromír Jermář en Karlovy Vary kaj fraŭlino Věra Tlapáková edziĝis la 11-an de januaro 1947. Ili akceptu nian sinceran gratulon.

## LOKAJ INFORMOJ

**Brno.** — E. K. aperigis presitan tre bele tipografie aranĝitan programon de kunvenoj 1947, kiu fiksas temojn por ĉiu mardo en januaro—aprilo en hotelo Passage, Lidická 23.

**Doksy.** — La kurso malfermita de la EK la 1. X. havas 23 p. Instruas marde kaj vendrede je la 18.30—20 h., en ĉambro de burĝa lernejo s-ano ŝpŭr.

**Litomyšl.** — Kurson por 6 p. gvidas s-ano Svoboda.

**Němčice apud Litomyšl.** — S-ano Buben gvidas kurson, 5. p.

**Nová Role.** — La Kultura komisiono de tiu ĉi loko organizis kurson, 20 p., gvidas Dro Vaněk, lunde kaj ĵaŭde en virina klubejo. La kursano konsistas ĉefe el studentoj de keramika lernejo kaj oficistoj de industriaj entreprenoj, el kies tre internacia rilataro oni volas forigi la restojn de germana influo.

**Vitkovice.** — 6. XI. ŪRO malfermis kurson. La unuan lecionon partoprenis 16, la duan 35, la trian 38 p. Instruas s-ano Raška, merkrede je la 16—18 h., en Závodní hotel.

**Praha.** — Kurso en ŪRO Laborlernejo komencis en novembro 1946 kun 33 p. Instruas A. Slanina.

**Klimkovice.** — ŪRO organizis kurson, 11 p. Malfermo 4. XI., instruas s-ano Raška, ĉiulunde je la 18—20 h. en la sekretario de la Junulara organizo SČM.

**Trutnov.** — S-ano Šafránek, drogisto, aranĝis mem kurson malfermitan 28. X. kun 12 p. — ŪRO ne havis intereson, loka EK ĝis nun ne ekzistas. Instruĉambro disponigis la fervojo, lecionoj okazas ĉiujauĉe je la 19a.

**Tepliče-Šanov.** — 28. XII. publika kunveno kun parolado kaj diskuto. Krom lokaj s-anoj ĉeestis 23 gastoj, ankaŭ el najbaraj lokoj. La kunveno antaŭiris ekspozicio instalita en du fenestregoj de hotelo De Saxe kaj dum la kunveno oni aranĝis tre instruajn ekspoziciojn sur 5 tabloj laŭ fakoj: Turismo, literaturo, gazetoj, filatelio k. s. Sekvis aliĝoj al kurso du- aŭ trigrupa. La vizito de alilokaj s-anoj, salutleteroj de aliaj kaj telegramo de EAĈSR multe subtenis la rezulton de malfacila laboro. Fondo de loka EAĈSR-grupo estas preparata.

**Třebíč.** — La 4-an de oktobro p. j. malfermis Žerotinova vyšší škola lidová esperantan kurson, kiu gvidas s-ano Th. Kilian. En la kurson enskribiĝis 35 ĝenuloj, la instrueroj okazas ĉiuvendrede de la 20-a ĝis 21-a

horo 30 minutoj en klasejo de komerca akademio. La kurso, kiu estas bone vizitata, ŝanĝiĝos ĉe sia finigo en esperantan klubon kaj la instruhoroj en klubajn kunvenojn. La urbestro, s-ano Antonin Brabec, bona kaj fervora esperantisto, jam disponigis al la fondota klubo konvenan ejon en la publika legejo de la urbo, pro kio ni esprimas al li nian sinceran dankon.

La loĝantaro de la urbo estas al esperanto tre favora, kion pruvas plej efike la fakto, ke la loka delegito de IEL, s-ano Th. Kilian sukcesis kolekti 1906 subskribojn por la Petskribo, t. e. 10% de la tuta loĝantaro. Se ĉiu izolulo aŭ klubo „prilaborus“ sian lokon kun sama energio kaj persisto, kiom da centmiloj da subskriboj kolektiĝus nur en nia respubliko? Sur la tuta mondo ĝi farus milionojn kaj IEL, ne devus „fieri“ pri 15-dekmiloj da subskriboj. Entute s-ano Kilian kolektis kaj forsendis al IEL 3640 subskribojn el proksimume 150 lokoj de nia respubliko. Li sukcesis kolekti pere de siaj eksterbaj amikoj kaj estintaj lernantoj ekz. en Praha pli ol 100 subskribojn; ĉu ĉiu s-ano loĝanta en Praha kolektis almenaŭ la saman kvanton? Sed li havas subskribojn ankaŭ el Plzeň kaj Ostrava, Liberec kaj Znojmo. Inter la subskribintoj troviĝas 14 parlamentanoj (apartenantaj al ĉiuj kvar politikaj partioj), 3 universitataj profesoroj kaj 1 vicprezidanto de la Landa Popol-Reprezentantaro (ZNV) en Brno; inter la subskribintaj parlamentaj deputitoj troviĝas la konata Nurnberga atestinto d-ro Fr. Bláha, la prezidanto de la Centra Sindikato (kun 2,000,000 da anoj) Antonin Zápotocký, la universitata profesoro kaj prezidanto de la Internacia Partizana Asocio d-ro Josef Grňa, la ministro por industrio Bohumil Laušman kaj la prezidanto de la parlamento Josef David, la „dua viro en la respubliko“, ĉefepiskopo en Praha Dr J. Beran.

La favoran sintenon al esperanto flanke de nia loĝantaro ni dankas grandparte al nia loka gazeto Jiskra, kiu jam en sia unua postmilita numero aperinta la 17-an

de majo 1945 menciis sian favoron al nia movado promesante regulan angulon al esperanto. La unua longa artikolo „Liberan vojon al Esperanto“ de s-ano Th. Kilian aperis jam la 31-an de majo 1945 kaj ĝi estas verŝajne la unua poresperanta artikolo, kiu aperis en la ĉeĥa gazetaro post la elpelo de la germanaj okupintoj. De tiu tempo regule aperas en Jiskra pli malpli longaj artikoloj pri Esperanto aŭ novaĵoj el Esperantujo, pro kio la redakcio meritas nian sinceran dankon. Samideanoj, kiuj deziras aperigi siajn ne tro longajn artikolojn en ĉeĥa gazeto, turnu vin al la redakcio de Jiskra en Třebíč. Precipe ŝatataj estas interesaj leteroj (tradukitaj), kiujn vi ricevas de s-anoj el eksterlando.

Ni revenu al la Petskribo. Ĉu ne povus ĉiu s-ano kolekti almenaŭ cent subskribojn? Tiom da geamikoj, geparencoj, gekonatuloj kaj kunlaborantoj en la oficejo aŭ laborejo havas certe ĉiu. Alie IEL, t. e. NI ĝisvivos fiaskon!

**Trnava.** — La 1an de decembro 1946 okazis fonda kunveno de la SES loka grupo en hotelo Imperial kun ĉeesto de lokaj kaj eksterlokaj gesamideanoj kaj estraro de SES el Bratislava. Estis elektitaj prezidanto D. Lackovich, komercisto; vicprezidanto J. Jedlička, gimnazia profesoro; sekretario A. Čambál, studento kaj organiza fakdelegito de UEA; kasistino I. Kollerová, tajlorino. Krom ili ankoraŭ 8 komitatanoj sen funkcioj. Antaŭ la fermo de la ĝenerala kunveno s-o prof. Lanák anoncis, ke li komence de dua duonjaro 1946/1947 komencos instrui esperanton en loka komerca akademio al 50 aliĝintoj. Adreso: Aug. Čambál, studento en Trnava, Kozácká 17.

**Vodňany.** — EK „La Progreso“ malfermis 10. I. kurson por 16 p. (komenca nombro 13). Gvidas Slepíčka, marde kaj vendrede en klubejo, restoracio „U Slepíčků“. Kunvenoj neregulaj. Propaganda kesto sur la ĉefplaco. Malsufiĉa hejtmateriale prokrastas malfermon de plua kurso en burĝa lernejo.

## LINGVO

### Překlad úkolu 7.

Ni, la popolo ĉeĥa kaj slovaka, el nia tuta koro kaj en ne disigebla unueco promesas en ĉi tiu historia momento, ke per honesta laboro, fidele, discipline kaj el ĉiuj niaj moralaj kaj fizikaj fortoj ni plenumos kun amo — kaj ĉiu sur sia loko — la noblan taskon<sup>1</sup> de la granda rekonstrua plano, donita al ni de la amata patrujo.

Fidelaj al la viktimoj de la batalo por libereco, indaj je la ideoj<sup>2</sup> de tiuj, kiuj ne ĝisvivis, danko-ligataj al ĉiuj, kiuj trapasis<sup>3</sup> la doloron kaj sangon, plenigitaj de amo al la venantaj generacioj kaj senkompataj al la kontraŭuloj<sup>4</sup> de la verko, ni promesas je nia honoro kaj antaŭ la tuta mondo, rigardanta nin,<sup>5</sup> ke ĉion en la batalo atingitan<sup>6</sup> ni sekurigis per venko de ekzempla<sup>7</sup> laboro. — La volbo de la historia oktobra datreveno resonu en la estonteco ankoraŭ pli glorie per la finita klopodado, al kiu ni fiere kaj solene devo-ligas nin.

Ni, la popolo ĉeĥa kaj slovaka, ŝanĝos la dujaran planon je ago!<sup>8</sup>

Ni promesas! Ni promesas! Ni promesas! Sukceson al la dujara plano!

Komunista partio de Ĉeĥoslovakio. — Ĉeĥoslovaka partio naci-socialista. — Ĉeĥoslovaka partio popola. — Ĉeĥoslovaka social-demokratio.

### Poznámk y.

<sup>1</sup> ordon; <sup>2</sup> indaj je la celado de tiuj...; indaj je la ideoj postlasitaj de...; indaj de la postlasaĵo; <sup>3</sup> trairis; <sup>4</sup> malhelpantoj, ĝenantoj; <sup>5</sup> mondo, kiu nin rigardas; <sup>6</sup> ĉion kion ni atingis en la batalo; <sup>7</sup> senekzempla, ekzemplodona; <sup>8</sup> al ago, en agon.

Překlad zaslali tentokrát jen 4 pánové: Jar. Čížek, Praha, Frant. Kuba, Olomouc, B. Novotný, Liberec, Julius Procházka, Rajhrad. Příčina malé účasti snad byla v tom, že v textu zůstalo datum po vydání čísla. Vynasnažime se, aby se to neopakovalo.

### Úkol 8.

Předkládáme k překladu tentokrát text o technice, tedy téma trochu jiné. Račte nám překlady poslati do 31. března!

Není tomu tak dávno, co se mnozí dívali na techniku velmi nevlídně. Byla to těžká hospodářská krize. Byly miliony a desítky milionů nezaměstnaných. Hovořilo se o nadvýrobě. Sklady byly plné a lidé nemohli kupovat, protože neměli peněz. A peněz neměli, protože nemohli pracovat, protože se nic neprodávalo, protože ti druzí nemohli kupovat, protože neměli peněz. Začarovaný kruh. A mnozí obviňovali techniku. Dělá prý stroje, které nahradí mnoho lidí. Dělá prý toho přespřilíš. Považovalo se za velký úspěch, když kdesi na stavbě silnice zastavili velký stroj, který rýpal zemi po celých vozíčkách a když místo stroje se lopotili lidé krumpáčem a lopatou.

Chválíme mladého muže, který potkal babičku s těžkou nůši a kus cesty jí nůši nesl. Byl to jistě hodný muž. A máme zatracovat techniku, která může pomoci milionům a milionům lidí tím, že z nich sejme břímě tělesné. hmotné námahy? — Lidská bída v minulých věcech vyrůstala z lidského zřízení. Měla však i příčiny, které bychom mohli nazvat technickými. Výroba některých věcí, dnes zcela běžných a samozřejmých, byla tak nerozsáhlá, pomalá a nedokonalá, že stačila jen pro málo jednotlivců. Dnes technika může vyrobiti mnoho věcí pro všechny. Předpokládá to ovšem účelnou organizaci celé technické práce a novou organizaci společnosti.

# INFORMOJ

**Vojaĝo al la kongreso en Bern.** Ni ne forĝesis la aferon, ni traktas kun la oficejoj, sed la eksterlanda valuto estas ĉefa punkto, ĉirkaŭ kiu turniĝas la nekontentiga afero. Ne forĝesu, ke nia ŝtato devas ŝpari eksterlandan valuton por diversaj necesaj bezonoj (nutraĵo kaj industrio). Traktante kun la aŭtoritatoj ĉie ni trafas la saman respondon. La raporto pri la pago de kongreskotizo al LKK en Bern pere de niaj bankoj estas pritraktata laŭ la normalaj motivoj kutimaj inter la landoj kun bona valuto. Nia ŝtato apartenas al la landoj, kie la publika mastrumado estas laŭregule administrata, ankaŭ koncerne eksterlandan valuton. Pro tio ĉiuj pagoj al la konto de eksterlanda posedanto devas esti permesitaj de Nacia banko ĉeĥoslovaka. Ne sendadu la kotizojn por la XXXII-a nur kiam ni havas garantion, ke niaj samideanoj povos partopreni la kongreson. Ni ĝustatempe informos vin. Kvankam sukcesis du aŭ tri samideanoj jam pagi la kotizon, ili ne havas garantion, ke ili sukcesos partopreni la kongreson. Sola ebleco estas, ke la kongreso povos esti vizitita de nemultnombra delegitaro kun tre limigita monsumo. Do ne planu inviti Viajn familianojn; feliĉo trafos tiun, kiu sekcesos veturi sola. Ni ŝparu kaj esperu, ke nia tutŝtata ekonomia politiko por sekvonta jaro pliboniĝos kaj estos pli favora al ni vizititaj nian XXXIII-an multnombre. Ni esperas, ke venontan fojon ni povos informi Vin pli ĝoje.

Boh. Paleček, ĝen. sekretario.

Jam de jaro 1906 ekzistas **Tutmonda Laborista Organizo, Paco-Libereco**, poste nomata **Liberiga Stelo**, kaj en jaro 1921 ĝi alinomiĝis je **Sennacieca Asocio Tutmonda**. Ĝi celas utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda, kaj kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj kaj tiel kreskigante ĉe ili la fortikan senton de homeca solidaro. Plue ĝi celas lernigadi, instruadi kaj klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj el la tiel nomataj internacianoj. Ĝi servas kiel peranto ĉe la interrilatoj de ne-samlingvaj asocioj, kies celo estas analogia al tiu de SAT, kaj ĝi peras kaj helpas al kreado de literaturo spegulanta la idealojn de la tuta laboristaro. — Ĝi estas rimarkinda faktoro en Esperanta movado, organizante ĉiujare sukcesan tutmondan kongreson. Ĝi unua aperigadis semajnan esperantan gazeton »Sennaciulo« en 10.000 ekzempleroj. Ĝi estas organizo spegulanta la idealojn de la laboristaro kaj oni devas agnoski ĝian gravan signifon. Ĉiuj laboristoj fariĝu anoj de via tutmonda organizo. La kotizo por jaro 1947 kun abonpago de ĝia monata organo »Sennaciulo« estas 40.— Kĉs. La mono kun ĝusta adreso estu sendata al ĝia landa peranto Josefo Patera, Plzeň, Dvořákova 24. Vi povas ankaŭ uzi la poŝt-pagilon: Jos. Patera, Plzeň, Nro 87857. — Slovakaj gekamaradoj informu vin ĉe peranto por slovaka regiono, k-do Kollmann, Bratislava, Dunajská 84, kaj samide-

anoj, loĝantaj en la okcidenta kaj norda lim-regiono, petu informojn ĉe k-do Josefo Eliáš, Kunderatice 217, okr. Chomutov. Ne forĝesu enmeti la poŝtmarkojn por la respondo.

SAT-peranto.

Zástupcem světového svazu dělnických esperantistů SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) pro Československo jest Josef Patera, Plzeň, Dvořákova 24. Na tuto adresu buďtež zasílány záležitosti, týkající se dělnických esperantistů. Předplatné časopisu »Sennaciulo« i se členstvím SATu jest pro rok 1947 pouze 40.— Kĉs. Při placení použijte pošt. složenky: Josef Patera, číslo 87857.

## LETEROJ EL GREKIO

Tesaloniko la 23an de decembro 1946.

I. Kara samideano.

Mi ricevis vian afablan poŝtkarton kun la rilataj bondeziroj kaj mi multe dankas vin. Mi ankaŭ deziras al vi feliĉan kristnaskon, prosperan novjaron kaj bonan estonton. En via lando ĉiuj ĉi-tiuj estas realigeblaj, dum en mia lando... bedaŭrinde ne! Kaj jen kial: De post la sepa de decembro mia edzino estas arestita kaj bategita de la fipolicistoj, pro tio, ke ŝi subtenis partizanojn mone kaj morale. Mi vidis ŝin antaŭhieraaŭ. Ĝis tiam oni ne permesis al mi vidi ŝin. Ŝi ne povas piediri. Pro la bategoj per drata vipo ŝia tuta korpo estas nigra kaj plena de kontuzoj kaj vundoj. Mi ne scias kion fari. Justeco en mia lando ne ekzistas. Se mi protestos, mi ankaŭ estos arestita kaj tiam kie restos miaj 4 infanoj? Estas bedaŭrinde! Hieraaŭ oni plenigis aŭtomobilon per demokratoj, ligitaj je la manoj kaj piedoj, kondamnitaj, kaj oni eksplodigis bombon kaj ĉiuj kondamnitaj estis mortigitaj. Hodiaŭ la faŝistaj ĵurnaloj de nia urbo skribis, ke partizanoj fajropereigis la aŭtomobilon kaj ke en la aŭtomobilo estis laboristoj, kiuj iris labori... Mia edzino estas ĝenerala sekretario de la Tesalonika esperanto ligo. Oni perforte devigis ŝin skribi leteron, ke ŝi ne estas batita! La ĝenerala ministro de Macedonio, kiu estas kuracisto, kvankam oni diris al li, ke mia edzino, estas forte bategita, ne estis konvinkita de la protestintoj, ĉar li fidis al la perforte skribita kaj publikigita en la ĵurnaloj letero de mia edzino. En mia lando ekzistas neniu, al kiu mi povas diri miajn animajn turmentojn. Ĉu vi povus en ĉeĥaj ĵurnaloj publikigi leteron de mia edzino? Se jes, mi estas dankema al vi. Mi ĝis nun ne ricevis leteron de vi, en kiu vi respondus al la demandoj de mia antaŭa letero.

Je la mezo de januaro oni juĝos mian edzinon ĉe la milita tribunalo. La policistoj diras, ke oni eble mortkondamnos ŝin. Ni vidu. Ĉu vi povus helpi mian edzinon de tie? Kune kun mia edzino oni juĝos preskaŭ 80 aliajn gepatriotojn. Helpu ilin! Esperante, ke mi baldaŭ ricevos vian afablan respondon, mi restas

kun samideanaj salutoj Dragonas.

II. Al ĉiuj eksterlandaj organizoj de virinoj kaj esperantistoj.

Karaj gefratoj!

Mi estas patrino de kvar infanoj. Ek de la sepa de decembro mi estas arestita kaj bategita ĉe la 11a Polica sekcio de Tesaloniko. Mi estas sekretariino de Tesalonika esperanto ligo kaj anino de la Nacia solidareco de Grekio. La policianoj traserĉinte mian domon, forprenis multajn librojn kaj inter ili la registrolibron de la Tesalonika esperanto-ligo. Mia edzo estas vegetarano kaj kasisto de la teosofia loĝio »Pithagoras« de nia urbo. Per ĉi tiuj vortoj mi petas vin protekti min kontraŭ la teroro de policianoj. Mia vivo troviĝas en danĝero. Oni bategis min tiel, ke multaj nigraj kontuzoj estas sur mia vi-

### ALVOKO AL KOMERCISTOJ

Esperantista klubo en Hradec Králové faras sekvantan iniciaton:

Por ke oni povu jam nun praktike uzi esperanton, ni faros liston de esperantistoj-komercistoj. Gesamideanoj sciante pri esperantistaj firmaoj certe aĉetos unuavice ĉe siaj ĝeamikoj. Ankaŭ komercistoj-samideanoj povos aĉeti ĉe esperantistaj firmaoj, liverantaj poĝrande. — Tiu nomaro estos kompreneble uzata ankaŭ en eksterlanda komerca kontakto. Do ni petas la samideanojn-komercistojn, ke ili sendu kiel eble plej baldaŭ siajn precizajn adresojn kaj fakojn al s-ano F. Pytloun, Zámeňhořstrato Nro 1010, Hradec Králové 2.

La redakcio tre rekomendas tiun ĉi iniciaton de la agemaj samideanoj. Ĝi petas sole, ke kunmeto de tiu listo estu tasko sole de la iniciatinta klubo. Ĉiuj sendu la adresojn al Hradec Králové, neni kolektu ilin aparte!

### Účast na sjezdu v Bernu

Upozorňujeme naše samideány, že svazová delegace v počtu čtyř zástupců v čele s předsedou svazu jednala v těchto dnech s národní bankou - devisové oddělení - a bylo uznáno, že vskutku není možno žádat povolení výpravy čs. esperantistů do švýcarska na kongres, ačkoliv Svaz uvedl všechny možné eventuality, jak by se mohlo žádostem našich samideánů vyhovět. Mluví národní banky podotkl, že ani velké organizace jako ÚRO nemohou počítat s větší delegací do zahraničí než 8—10 osob a proto poměrně náš Svaz může počítat maximálně se 6 členy, kteří jako delegáti budou moci do Švýcar. Kdo nemá soukromou možnost, mimo rámec esperant. činnosti svazové, získatí povolení k cestě do Švýcar, neposílejte přihlášku na kongres, protože je nepravděpodobno, že budete moci odcestovatí. Kdo z esperantistů získá toto povolení jinak (obchodně, studium atd.), ten nebude počítán do počtu delegace. Proto se soukromá snaha nikterak s naší strany neomezuje, avšak Svaz je v této věci bezmocný. Bylo nám řečeno, že až se republice povede lépe, zajedeme si, kam budem chtít, dnes to ale nejde. Myjeme si ruce — nalili jsme čistého vína. Adolf Malík.

zaĝo. Oni ne permesas al miaj ĝefamilianoj, vidi min. Mi do petas helpi ĉiamaniere min per protestoj k. t. p. Esperante, ke viaj klopodoj savos min, mi restas kun paco kaj amo

Marika Dragonas,  
sekretariino de Tesalonika esperanto ligo.

Al S-ro V. Vondra, studento,  
Ĉ. Budějovice, Kněžská 13.

La letero ricevita en Ĉ. Budějovice la 9. 1. 1947.  
Sendinto: Nikolo Dragonas, Ethnotrapeza,  
Tesaloniko, Grekio.

La letero sendita el Tesaloniko la 24. 12. 1946  
per aerpoŝto.

### REGULA KONGRESO 1947

de nia asocio  
estos en Praha  
dimanĉon la 30-an de marto je la 9-a h.  
en kafejo Louvre.

### RADIO PRAHA

Ĉiutagaj esperanto-programoj.

Samideanoj, kiuj ne povas kapti la mallongajn ondojn de Praha (31.41 m je la 19-a horo kaj 49.92 m je la 23a horo) aŭskultu ĉiutage je la 19-a horo MET la longan ondon de Praha 1961 m, kiu estas bone aŭdebla en Ĉeĥoslovakio kaj landoj najbaraj. Sabate informoj pri nia movado, dimanĉe kufime literatura programo.

Priložený letáček XI. sletu zašlete svému dopisovateli v zahraničí. — Další výtisky vyžádejte si u Sletové kanceláře, Praha III, Tyršův dům. Požádejte svého zahraničního dopisovatele, aby si tamtéž vyžádal ilustrovanou esperantskou brožuru o sletě, která bude vydána, ukáže-li se dostatečný zájem mezi samideány.

### SOMERA ESPERANTO-LERNEJO EN DOKSY

La de la »Doksanoj« siatempe elektita preparakomitato (sam-oj Šolc, dr. Pitlik, Slanina, Špúr) kunvenis la 26. I. 47 en Mladá Boleslav kaj decidis en la kadro de la 14-taga »Somera esperanto-lernejo« en Doksy malfermi de la 26. VII.—9. VIII. 1947:

- kursojn por komencantoj;
- kursojn por progresintoj;
- seminarion por funda studado de esp. gramatiko, historio de la esp. movado (enlanda kaj eksterlanda) kaj esp. literaturo;
- oratoran seminarion kaj prelegojn pri uzado de esp. en praktika vivo (moderna reklamo).

La kursanoj loĝos laŭvole en hoteloj kaj privataj loĝejoj (eble ankaŭ komunaj). — Societaj (amuzaj) aranĝoj estas preparataj. Oni zorgas ankaŭ pri ĉeesto de eksterlandaj samideanoj. — Nombro de ĉeestantoj estos limigita, petu do tuj tiurilatajn informojn de samideano Karolo Šolc, dipl. esp. instruisto en Mladá Boleslav I, Železná 11.